



Zbigniew GALOR

ESPERANTO KAJ ESPERANTISTOJ EN SPEGULO DE SOCIOLOGIAJ ESPLOROJ

La prelego prezentas bildon de esperantistoj kaj esperanto-movado surbaze de sociologiaj esploroj kaj studoj kiel tiu de Peter G. Forster, Frank Stocker, Nikola Rašić kaj baziĝas ĉefe sur la rezultoj de la sociologiaj esploroj publikigitaj en la libro de Zbigniew Galor kaj Jukka Pietiläinen „UEA en konscio de esperantistoj“ (2015). Ĝi provas kompari nuntempan evoluon de esperantista movado en Okcidento kaj Oriento, konsiderante ilian socian bazon, sociekonomiajn kaj kulturajn procezojn ligitajn ankaŭ kun tutmondiĝo. La aŭtoro starigas ankaŭ demandojn, ĉu la eŭropaj esploroj aplikeblas al la azia esperanto-movado, kiujn konsekvencojn la lingva monda merkato havas por esperanto en Eŭropo kaj Azio.

Zbigniew GALOR pola sociologo, universitata profesoro, estro de Katedro pri Ĝenerala Sociologio ĉe la Universitato de Szczecin. Doktoriĝis pri filozofio kaj sociologio kaj habilitiĝis pri sociologio. Preleganto de la Interlingvistikaj Studoj UAM en Poznano, profesoro de AIS (Akademio Internacia de Sciencoj). Esperantisto ekde 1968.

Interesiĝoj: • filozofio antropologia kaj socia • sociologio teoria (ĝenerala) • socia-ekonomia evoluo, laboro, senlaboreco • (lumpen)proprietajo, marĝeniĝo kaj ekskludo • sociologio de kulturo, speciale: klasa, eŭropa, socimarĝena; subkulturo • sociologio de esperanto-movado kiel socia, lingva movado.

Esperanto estas kaj parto de lia persona vivo (edzino: Ilona Koutny), kaj objekto de liaj sciencaj esploroj kaj formo de lia socia organiza, kultura agado. Estis: iniciatinto kaj gvidanto de la unua studenta scienca esperanto-rondo en UAM, prezidanto de Pola Kooperativa-Esperanto-Organizaĵo, prezidanto de AIS-Pollando, ĉefa iniciatinto de SEG (Sociscienca Esperanto-Grupo, 2007-2010); aŭtoro kaj gvidanto de esplorprojekto: *UEA en konscio de esperantistoj*. Regule prelegas pri fakaj demandoj (ofte dum ARKONES: Artaj Konfrontoj en Esperanto, Poznano), verkas artikolojn kaj librojn pri sociologiaj temoj.

Pli detala biografio kaj listo de publikaĵoj: <http://www.zbigniewgalor.pl>,

https://pl.wikipedia.org/wiki/Zbigniew_Galor

Retadreso: zbigniew.galor@gmail.com



KOUTNY Ilona naskiĝis kaj edukiĝis en Hungario, ekde 1997 vivas en Pollando. Diplomiĝis pri matematiko, franca filologio kaj esperantologio, poste doktoriĝis pri lingvistiko en la Budapeŝta Eötvös-Universitato (HU) kaj habilitiĝis ĉe la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznano (PL). Esperanto estas parto de ŝia profesia kaj privata vivo ekde jardekoj. Lingvoj, komunikado kaj matematiko interesis ŝin dekomence, tiel ŝi lernis kelkajn lingvojn kaj longe okupiĝis pri komputa lingvistiko.

Ŝi instruis esperanton dum jardeko ĉe la Esperanto-fako de Eötvös-Universitato kiel posteulo de prof. Szerdahelyi, krome aplikatan kaj komputan lingvistikon. Nun kiel profesoro en UAM ŝi estras la Finno-Ugran Katedron kaj la internaciajn postdiplomajn Interlingvistikajn Studojn kiun ŝi fondis en 1998. Tie ŝi prelegadas pri internacia kaj interkultura komunikado, esperanta lingvistiko kaj metodiko. Ŝi okupiĝas ankaŭ pri la rilatoj inter lingvo kaj kulturo, pri pragmatiko kaj leksikografio. Membro de la Akademio de Esperanto (1998-2016), profesoro de AIS.

Ŝi prelegas pri fakaj temoj en diversaj konferencoj kaj gvidis kursojn (ekz. ĉe la usona NASK); verkas artikolojn en diversaj lingvoj, pretigis kelkajn vortarojn (Hungara-Esperanta meza vortaro kun I. Szerdahelyi, trilingvajn laŭtemajn etvortarojn). Pli detala biografio kaj listo de publikaĵoj: <http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/interlingvistiko/Ilona.html>; intervjuoj: <https://www.youtube.com/channel/UCmXNo743zPZTgb1xmHFiUDA>, <http://pola-retradio.org> (11.10.2016).

Retadreso: ikoutny@amu.edu.pl

Por la Azia Kongreso:

Eŭropaj kaj aziaj trajtoj de esperanto

Oni ofte varbas por esperanto per ĝiaj simpleco, reguleco kaj facila lernebleco. Kiel mezuri la facilecon kaj ĉu por ĉiuj esperanto same facilas? La kontribuo prezentos esperanton el la vidpunkto de lingva komplekseco, analizante diversajn lingvajn nivelojn ekde elparolo tra vortostrukturo kaj frazostrukturo ĝis leksiko kaj lingvouzo, montrante la regulecon kaj travideblecon de esperanto, sed ankaŭ iujn problemojn, se konsidi la gepatrajn lingvojn de la lernantoj.

En la spegulo de la analizitaj datumoj kaj komparoj kun kelkaj eŭropaj kaj aziaj lingvoj, la konkludoj emfazos la planitan malaltan kompleksecon de la internacia lingvo (fiksitan en la *Fundamento*), konservitan en la gramatika nivelo kaj la relative grandan semantikan travideblecon (tamen kun eŭropa fono), dank'al ĝia dinamika evoluo en internacia parolkomunumo. Tio multe helpas la facilajn komprenon kaj alproprigon de esperanto, sed procezoj de enleksikiĝo kaj metaforiĝo aperas kiel ĉe naturaj lingvoj kiuj ne por ĉiuj kulturanoj estas evidenta. Dum la instruado necesas konsciigo pri la ebla malsameco en la kompreno supozante komunikantojn el diversaj kulturoj.

Por la ILEI-seminario (akceptita de prof. Xiaofeng Gong):

Universitata instruado de esperanto kaj esperantologio, kunlaboreblo inter Eŭropo kaj Azio

Instruado de esperanto en la oficiala eduksistemo gravas el la vidpunkto de ĝia disvastiĝo kaj statuso. La universitata instruado havas specifan rolon en la diskonigo de esperanto kaj ĉefe en la profesiigo pri esperantologio, speciale pri instruado, krome esperanto povas servi ankaŭ kiel instrulingvo. Post trarigardo de la loko de esperanto en la superagrada instruado, la prelego fokusiĝos al la 3-jara kompleta formado de esperantologoj inkluzive instruistojn kadre de la Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando). Ĝi serĉos la kunlaboreblojn kun aziaj partneroj kaj skizos la novajn planojn por esperantlingvaj universitataj magistras studoj.